



VALENCIENNES - ESPÉRANTO

# NORD-ATENA BULTENO

Jaro 36 – n°308  
Junio 2013

ESPERANTO = LANGUE AUXILIAIRE INTERNATIONALE


## *Inauguration de la rue Zamenhof à Beuvrages*



La plaque de Ludwik Zamenhof est dévoilée par Jean Dietrich, président de l'association Valenciennes Espéranto



Plus de cent trente logements neufs ont fait place aux anciens camus, des voies nouvelles, des espaces de convivialité ont été créés. Il ne manquait plus qu'à donner un nom à ces nouvelles rues. Samedi 19 avril, ce fut chose faite. André Lenquette, maire, de nombreux adjoints et conseillers, des familles aussi, tous tenaient à être présents lors du dévoilement des plaques.

Le conseil municipal a voulu rendre hommage à des personnalités marquantes de la vie beuvrageoise. Tout d'abord, ce fut Jean Chanat, ancien résistant, symbole des principes républicains et patriotes, puis vint le tour de Julien Dherbomez, résistant également. Il fut élu au conseil municipal de la ville et initiateur de nombreuses associations sportives. Jean Dime fut également élu de la ville et administrateur du CCAS et enfin fondateur des restos du cœur à Beuvrages.

### L'Espéranto à l'honneur

La ville a également honoré le docteur Ludwik Zamenhof, comme deux cents autres villes de France, fondateur de la langue Espéranto. Jean Dietrich, président de l'association Valenciennes Espéranto, représentait la famille de ce créateur de la langue universelle. La batterie fanfare de la ville était également présente jouant notamment l'hymne officiel espérantiste.

Une petite réception a clôturé cette manifestation au restaurant scolaire Alexandre-Boudart, permettant de rassembler les familles et amis, et à tous d'honorer encore une fois ces personnalités marquantes de la cité.

### La Voix-du-Nord

#### Quelques photos..... de « La Voix-du-Nord »


La résidence Mallet a fait peau neuve et trois de ses rues portent désormais le nom de personnalités qui ont marqué la vie des beuvrageois et la ville a également honoré le docteur Ludwik Zamenhof:



L'association Valenciennes Espéranto était venue pour honorer Ludwik Zamenhof, fondateur de la langue universelle.



L



U

ge





## Nova ZEO\* en la departemento Nord

Komence 2008, en la kadro de la renovigo de la kvartalo "Château Mallet", en Beuvrages (Apud Valenciennes), la urbestro kunvenis por antaŭvidi pri la nomoj de kvar novaj vojoj kiuj devus esti kreataj por komunikigi la estontajn loĝejojn de la renoviga rezidejo.

Jean Dietrich, prezidanto de Valenciennes-Esperanto, kiu bone konas la urbestron, sugestis al li ke estus bone se unu el la estontaj vojoj nomiĝu strato Zamenhof aŭ strato Esperanto.

Fine de junio, Jean Dietrich, Xavier Dewidehem, kiu tiam loĝis en Beuvrages, kaj Jean-Marc Fratard renkontiĝis kun la urbestro de Beuvrages cele argumenti pri la propono nomi straton "Zamenhof" aŭ "Espéranto".

La 18an de februaro 2009, la municipa konsilaro procedis al la nomiĝo de la novaj stratoj kaj unuanime estis akceptitaj la kvar nomoj proponitaj, inter ili estas la strato "Ludwick L. ZAMENHOF".

Sabaton la 20an de aprilo 2013 okazis la inaŭguro de la stratoj. Sub suna, blua ĉielo sed kun freŝa vento, pli da centoj da personoj trairis la novan, belan kvartalon por inaŭguri la kvar stratojn.

Tri stratoj estis dediĉitaj al personoj de Beuvrages kiuj siatempe agadis por la komunumo, por lokaj socialaj organismoj aŭ aktive partoprenis en la rezistado dum la 2<sup>a</sup> monda milito... temas pri Jean Charat, Julien Dherbomez, Jean Dimé.

Antaŭ la senvualigo de la ĉiu stratplato, la urbestro André Lenquette prezentis la agadojn faritajn de la koncernatulo en ĉeesto de familianoj, sekvis senvualigo kaj varmaj aplaŭdoj. La kvara senvualigo esti la strato "Ludwick L. Zamenhof", tie la municipa harmonio ludis francan marŝon kaj la urbestro prezentis al la ĉeestantaro Zamenhof-on kaj lian idealon de paco konkretigita per la internacia lingvo Esperanto. Poste Jean Dietrich dankegis la urbestron kaj legis la mesaĝon kiun estis sendita Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, la nepo de Ludiviko Zamenhof.

*«Monsieur le Maire, Messieurs et Mesdames Conseillers Municipaux,*

*Je viens d'apprendre, que vous avez décidé de donner le nom de ZAMENHOF à une des rues de votre ville.*

*Etant moi-même le petit-fils Zamenhof, j'en suis touché, comme toujours dans des circonstances pareilles. Et je vous félicite de votre décision, grâce à laquelle la ville de Beuvrages va entrer dans la famille des villes, grandes et petites, dont des centaines*



*sont disséminées à travers notre monde, villes dans lesquelles une rue, une place ou un square porte ce même nom.*

*Espérons, que les hommes et les femmes qui traverseront la rue ZAMENHOF de votre ville de Beuvrages, ainsi comme dans toute autre ville, auront une pensée pour des idées qui étaient celles de l'auteur de la langue internationale: de la fraternité des hommes de toutes les couleurs, de toutes les nationalités, bien que représentant des idéologies, voire des religions distinctes. Qu'ils forment tous une grande famille, chantée dans l'hymne des espérantistes.*

*Veillez recevoir, Monsieur le Maire, l'expression de mes hommages respectueux.*

**Louis Christophe ZALESKI-ZAMENHOF**

Tiam la municipa harmonio solene ludis "La Espero"-on. Sekvis varmaj aplaŭdoj. Ĉeestis multaj Nordfrancaj Esperantistoj el Lille, Arras, Valenciennes, kaj Belgaj Esperantistoj el Solre-sur-Sambre, Charleroi kaj Gand.

Tio farite, ĉiuj estis invititaj trinki honorvinon en pli varma loko: la lerneja restoracio Alexandre Boudait. Tie la urbestro André Lenquette denove prenis la parolon por kompletigi tion kion li diris dum la inaŭguro de la stratoj. Jean Dietrich, Xavier Dewidehem kaj Arlette Plutniak diris kelkajn vortojn respektive nome de Valenciennes-Espéranto, de Espéranto-France kaj de Nordfranca Federacio.

Tridekoj da esperantistoj kunmanĝis en restoracio en la apuda vilaĝo Bellaing.

\* Zamenhof-Esperanto-Objektoj

Jean-Marc Fratard

**Dans le restaurant....**







Photos de Jacques Telle

### Jean Dietrich, Président d'Honneur de la Fédération

Durant la réunion du Comité de la Fédération Espéranto-Nord, qui a eu lieu à Halluin, le 14 avril 2013, Edmond Plutniak a proposé que Jean Dietrich soit nommé Président d'Honneur de la Fédération pour plus de 62 années d'activités inlassables pour notre mouvement. La proposition a été acceptée à l'unanimité.

Varman gratulon al Jean Dietrich

### 21 et 22 septembre 2013 Forum des Associations

Salle Vauban, rue Magalotti à Valenciennes

Le forum accueillera 200 associations pour faire découvrir leurs activités et savoirs-faire, dont Valenciennes-Espéranto.

*Nous comptons sur votre présence à notre stand pour assurer une permanence constante.*

16-17 novembre 2013

### 25ème Rendez-vous Européen à Stella-Plage

Informations:

**Arlette Plutniak**

+33 (0)6 33 42 67 57

aplutniak@esperanto-nord.org

## Esperanto

### Dediĉita al la novaj geesperantistoj

— *Kial — oni min demandis —  
Esperanto logis vin,  
ke vi lernas ĝin konstante  
kun fervoro kaj sen fin' ?*

— *Mi ĝin lernas kun fervoro —  
mia estis la respond',  
ĉar mi volas, ke la paco  
regu en la tuta mond' ;*

*ĉar deziras mi, ke falu  
lingvaj baroj inter ni,  
ke kunligu la popolojn  
unu frata famil'.*

*Estas ĝi mirinda lingvo.  
Servas nin ĝi kiel pont',  
kunliganta diverslingvajn  
homojn en la tuta mond'.*

*Ja ne sola en la mondo  
mi fervore lernas ĝin.  
Lernas ĝin kaj eĉ ellernis  
hindo, polo, svedo, ĉin'...*

*Strebas mi renkonti ilin  
iam, kiel fraton frat',  
kaj manpremi, ĉirkaŭpreni  
kun fidela am' kaj ŝat'.*

*Lingva, rasa diferenco  
ke ne staru inter ni.  
Ke sincere kaj intime  
fluu la konversaci'.*

*Jen pro kio Esperanto  
tiel forte logis min,  
ke mi lernas ĝin konstante  
kun fervoro kaj sen fin'.*

**B. Berin, Vilnius (Litovio)**



## Ostendo

### *mallonga historia superrigardo*

La Flandra marbordo ne ĉiam lokiĝis kie ĝi estas nun.

En la 5a jarcento la mar-akvonivelo plialtiĝis tiel ke la akvo invadis la kontinenton ĝis distanco de proksimume 12 km, do ĝis linio pli malpli paralela al la nuna marbordo, kaj atinganta la regionon de nuna urbo Brugge.

La tuta teritorio, iam sub la akvo, estas nun la tre fruktodonaj Polderoj. Multaj historiistoj pensas ke la restaĵo de la iama Sünriverego, norde de Knokke-Zoute, kaj la Izerrivero ĉe Nieuwpoort (= nova Haveno), kaj la endigitaj «Moeren» (= marĉo) sur la landlimo de Flandrujo en la Belga ŝtato kaj Flandrujo en la Franca ŝtato, estas tri restaĵoj de tiu marosuperfluo.

Post la 5a jarcento la akvo tre malrapide retiriĝis. Pli kaj pli da insuletoj ekestis kiujn la monaĥoj endigigis. Sur la plej orienta parto de unu tia insulo, fiŝkaptistoj de Mariakerke (= preĝejo de Maria) konstruis fiŝhavenon Oostende. La nomo signifas «orienta finaĵo». Tiel oni kapablas kompreni la nomon se oni rigardas sur landkarto kaj rimarkas la situon de la vilaĝoj Westende (okcidenta finaĵo), Middelkerke (= preĝejo en la mezo) kaj Oostende. Ili estis la okcidenta, meza kaj orienta partoj sur tiu insulo. La dokumentoj - ek de la 9a jarcento - mencias preskaŭ ĉiam Oostende Terstreep aŭ Westende Terstreep (= sur la terstrio).

En 814 la vilaĝo Oostende estis posedaĵo de la abatejo de Sint Omaars (St. Omer en Franca Flandrujo). Ĝia haveno restis taŭga ĝis la duono de la dekdua jarcento. Tiam la sablo tro plenigis la markolon (ĉar, ja, la maro konstante kaj daŭre retiriĝis). Grafo Filipo de Elzaco konstruigis novan havenon Zandhove (= Sabloĝardeno) la nuna Nieuwpoort). La fosado de nova haveno ree bonigis ĝin tiel ke en la 13a jarcento ĝi estis floranta fiŝisthaveno. Antaŭe, grafo Roberto la Friso, estis konstruiginta la St. Petropreĝejon en 1072. En 1267 grafino Margareta de Konstantinopolo altrangigis la lokon al la rango de «urbo» kun ĉiuj koncernaj rajtoj kaj privilegioj. 1349 kaj 1404 du egaj akvosuperfluoj detruis grandparte la dunojn kaj la urbon. Fine, en 1445, grafo Filipo de Burgundio donis la rajton konstrui novan havenon flanke de la malnova urbo.

Tiu haveno situis okcidente de la urbo; la ĉirkaŭaj domoj kaj stratoj estis laŭplane konstruataj; kaj ne plu hazarde, unu post alia, kiel okazis pli frue. 1489 la urbo estis detruata de la armeoj de Maksimiliano de Aŭstrujo, kiu nuligis ĉiajn privilegiojn. Tiuj estis redonataj en 1500. 1502 nova superfluego detruis ree digojn kaj urbon (signifoplene rilate al la (mal) fortikeco de tiamaj fortikaĵoj!). La dua duono de la 16a jarcento estis por nia lando la tempo de la religiaj militoj kaj ribelado kontraŭ Hispanujo. Princo Vilhelmo de Oranjo fortikigis Ostendon en 1583 kaj ties filo Maŭrico ampleksigis ĝin en


1587. Arkiduko Alberto konkeris ĝin post sieĝo kiu daŭris pli ol 3 jarojn. Sekve la urbo estis unu vasta ruinaĵo. Normala komercotrafiko ne plu eblis, ankaŭ ĉar la Hispanoj malpermesis komercon kun la Hispanaj kolonioj. Depost 1650 Ostendo iĝis grava haveno de kaperistoj! Ja, la internacia traktato de Vestfaliao fermis la Skeldon por trafiko.

La situacio estis ŝanĝiĝonta kiam ni apartenis al Aŭstrujo. Ekestis la «Oostenda Kompanio» (kies sidejo estis Antverpeno!) de komercistoj kiuj volis (kaj povis de la registaro) komerci kun la malproksima oriento. Malfeliĉe tio daŭris nur 5 jarojn. La Aŭstria imperiestro cedis por alilandaj minacoj (1727). En 1780 la imperiestro Jozefo II deklaris Ostendon «libera haveno». Sekve tre multaj ŝipoj de militantaj landoj vizitis ĝin, tiel ke ĝi plivastiĝis ĝis la nuna «Hazekwartier» (= leporokvartalo). En tiu tempo, kanalo, kies konstruo komenciĝis en la dua duono de la 17a jarcento, ligis Ostendo kun Brugge kaj Gent. Do, la urbo disvastiĝis laŭlonge de tiu kanalo. Sed en la dua duono de la 19a jarcento komenciĝas la ekflorado de la turismo. De tiam la urbo pligrandiĝis laŭlonge de la marbordo. Ĝi ja iĝis la «reĝino de la banlokoj». Dum la du mondmilitoj la urbo multe suferis. En la unua ĝi estis haveno par la Germanaj submarŝipoj. La Angloj neniigis tiun havenon per la dronigo de ŝipoj ĝuste antaŭ la haveno (inter alie la «Vindictive») Nun ĝi estas urbo kun menciindaj industrio, komerco, arto, sporto, kulturo kaj mondama vivo.



Sieĝo de Ostendo far la Hispanoj

Drs. F. Roose, Brugge



## Esperanto ĉe la Bulgara Akademio de la Sciencoj

Post longjara obstina agado pri agnosko en Bulgario de AIS-Marino kiel internacia scienc-eduka organizaĵo, ni ricevis altan pritakson de nia longjara faka scienca agado flanke de la sciencularo en nia lando. **Je la 29-a de majo mi subskribis oficialan kontrakton pri kunlaboro inter Bulgara Akademio de la Sciencoj /BAS/ kaj AIS-Bulgario!!!**

Surbaze de tiu kontrakto ni organizos komunajn sciencajn aranĝojn kies oficialaj lingvoj estos la bulgara kaj ESPERANTO, kaj ankaŭ ni partoprenos internaciajn sciencajn aranĝojn de BAS dum kiuj al la ĝis nun uzataj oficialaj lingvoj /bulgara, rusa, angla, germana, franca/, kiel oficiala lingvo estos aldonota ankaŭ la internacia lingvo ESPERANTO !!!



Krom tio, AIS-Bulgario partoprenos komunan scienc-esploran agadon kune kun la scienculoj de BAS!

Ni komencos nian kunlaboron organizante kune la Simpozion AEPA-2013. Bulgara Akademio de la sciencoj kaj AIS-Bulgario estos la bazaj organizontoj de AEPA-2013. Prelegontoj estos eminentaj bulgaraj scienculoj de BAS!

**Prof. Bojdar Leonov**



## Une Semaine de Théâtre-château de Gresillon

La Maison Culturelle de l'Espéranto au château de Gresillon propose cette année une **Semaine de Théâtre**, du 10 au 17 août 2013, avec cours de théâtre en espéranto, cours d'espéranto sur le théâtre et cours de conversation, avec danses et chant ainsi qu'une session parfum individuelle, avec 3 spectacles en soirée: comédie sur les congrès espérantistes, théâtre sur Galilée, Chansons en espéranto...

Voir <http://gresillon.org/s5fr>

Apprendre et se perfectionner en espéranto, en s'amusant, en pratiquant le théâtre, dans un lieu idéal destiné aux espérantistes, c'est encore plus intéressant quand les enseignants sont professionnels du théâtre venant de l'étranger. Georgo Handzlik de Pologne et Sasha Filipovic de Serbie proposent un moment inoubliable de découverte, mais nous sommes inquiets de devoir tout annuler et de ne pas faire venir nos deux amis, puisque nous n'avons pas encore reçu assez d'inscriptions fermes. Aidez-nous à trouver des amateurs de théâtre original en espéranto, attirés par le travail avec un acteur professionnel.

Si ce stage ou les dates ne vous conviennent pas, choisissez parmi 4 autres semaines dans: [gresillon.org/ete](http://gresillon.org/ete) <<http://gresillon.org/ete>>

François LO JACOMO, prezidanto de Greziljono

La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo **Greziljono** invitas vin al interesaj semajnoj dum somero, aŭtuno kaj jarfino, ĉiam kun E-kursoj kaj aktivaĵoj:

6-13 julio: **Turisma Semajno** por ŝatantoj de turismado kaj ekskursoj al reĝaj kasteloj, de francaj historio, kulturo kaj lingvo, vidu en [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)

13-20 julio: **Art-Amatora Semajno** por hobiaj artistoj kaj ŝatantoj de teatro, dancado, kantado, muziko kaj grafika arto, vidu en [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)

20-27 julio: **Alternativa MOJOsejo** (por junuloj kaj pri alternativaj temoj) por vegetaranoj, verduloj kaj piratoj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, migremuloj, biciklantoj kaj tendumantoj, vidu en [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)

3-10 aŭgusto: **Festa Semajno** speciale por infanoj kaj familioj kun beboj, por adoleskantoj kaj junuloj, vidu en [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)

10-17 aŭgusto: **Teatra Aktora Semajno** por amantoj de teatro originala en Esperanto; dezirantaj labori kun profesia aktoro, vidu en [gresillon.org/s5](http://gresillon.org/s5)

26 oktobro - 2novembro: **Aŭtune, la ferioj**: Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj, vidu en [gresillon.org/autune](http://gresillon.org/autune)

28 decembro – 2 januaro: **Jarfina FESTego** kaj Novjara FESTeno laŭ franca maniero kun maskobalo

Ne hezitu kontakti nin telefone al +33-2.41.89.10.34

aŭ sendu retmesaĝon al [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

aŭ skribu al MCE Gresillon, St.Martin d'Arce, 49150 Bauge en Anjou, France.



## Dernières vidéos en relation avec l'Espéranto déposées sur Internet

Voici une sélection de vidéos relatives à l'espéranto apparues sur internet au cours du mois d'avril 2013:

- Témoignage d'une étudiante en médecine belge espérantophone de naissance (témoignage en espéranto après une minute de témoignage en flamand): **Magazinski - Zo Ben Ik: Karlijn**
- Enfants russes et japonais jouant aux cartes via internet en utilisant l'espéranto: **Rusaj kaj japanaj infanoj dum skajp-renkontiĝo**
- Logiciel d'apprentissage de l'espéranto pour téléphone Android: **Mia Amiko for Android**
- Jeune espérantiste vénézuélien parlant de la situation politique dans son pays: **Mesaĝo pri la venezuela nuntempa krizo**
- Jeune espérantiste ukrainien parlant de sa pratique de l'espéranto: **Pri mi kaj Esperanto**
- Rencontre conviviale entre espérantistes français et coréens: **Koreaj kaj Francaj esperantistoj havis amuzan tempon en koreio seulo kafejo LauliAn**
- Présentation pleine de bonne humeur de la quatrième édition de NOVA (rencontre espérantiste du nouvel an au Brésil): **NOVA - Novjara Aranĝo en Brazilo (en Esperanto)**
- Le thé, pont amical entre la Chine et le Japon: **Teo, Ponto de Amikeco - Japana esperantisto Usu...**
- Participation d'une espérantiste suisse de 90 ans au congrès universel d'espéranto de Pékin en 2004 (durée 1h30): **Lekanto al Pekino**
- Réclame en espéranto pour le "Café Espéranto" d'Herzberg (Allemagne): **Esperanto-Café und Ginseng-Laden in Herzberg**
- Diaporama de présentation des principales prépositions en espéranto: **Apprendre Espéranto - Les Prépositions**



- Centre d'apprentissage de l'espéranto au chateau de Bartošovice (Tchéquie): **Filmbulteno 1 - Esperanta lernejo en kastelo Bartošovice**
- Orchestre jouant la musique "Vivu-espéranto" du compositeur suédois Sam RYDBERG: **Vivu-Espéranto**
- Présentation de Mitsumasa Anno auteure japonaise de livre pour enfants: **Mitsumasa Anno**
- Reportage sur le 67ième congrès de TEJO sur une chaîne de télévision ukrainienne: **Esperanto**
- Reportage sur Aleksander MELNIKOV sur une chaîne de télévision ukrainienne: **Esperanto! Эсперанто в универе! А.Мельников**
- "Velkoj", texte de William Auld interprété par le chœur et l'orchestre philharmonique de Podlachie: **Velkoj - William Auld (Esperanto)**
- Dessin animé japonais sous-titré en espéranto: **Digimon Adventure 02 1-A Filmo Esperanto Mekjo**
- Vidéo à propos de Raymond Schwartz (en anglais): **Anni kaj Montmartre by Raymond Schwartz**
- "L'orage" de Georges Brassens chanté en espéranto par Gijom: **3 Gijom dum IJF 2013 en Ostuni "L**
- Version en espéranto de "La quête" de Jacques Brel par Fabrice Morandea: **La Strebo/ La Quête**
- Chanson "Somera vilao" interprété par le chanteur espérantiste japonais Sonori: **Somera Vilao - SoNori**
- Chanson "Rankvarteto" interprétée par Kajto: **Kajto Esperanta Kanto**
- Chanson en espéranto de 1981 "Mi ne parolas": **Ixna - Mi Ne Parolas**
- Chanson en portugais consacrée à l'espéranto: **Esperanto de Nadson Martins**
- "Bella ciao" en espéranto: **Ho, belulin', ĝis - Gianfranco Molle**
- "Commandante Che Guevara" en espéranto: **Che Gevara song en Esperanto (Ĝis revido gerilestro Ĉe-Gevara) - Gianfranco Molle**
- "El pueblo unido jamas sera vencido" en espéranto: **El pueblo unido jamás será vencido (en Esperanto) - Gianfranco Molle**
- "Grandola Vila Morena" (Hymne de la révolution des oeillets) en espéranto: **Grandula, Urbeto Bruna (Grândola Vila Morena) - Gianfranco Molle**
- "Hevenu shalom aleichem" en espéranto: **"Hevenu shalom aleichem" en Esperanto (Bonvenu paco sur vin)**
- "Hava nagila" en espéranto: **"Hava Nagila" en Esperanto (Ĝoju frato)**
- "Muzaiko" tuttempa esperanta retradio: [www.radionomy.com/FR/radio/muzaikoinfo/listen](http://www.radionomy.com/FR/radio/muzaikoinfo/listen).

Agrablan spektadon

**Jacques BARATIE** [[jacques.baratie@wanadoo.fr](mailto:jacques.baratie@wanadoo.fr)]

*Amike kaj samideane, Jean-Marc Fratard-Baudour*  
[valenciennes@esperanto-nord.org](mailto:valenciennes@esperanto-nord.org)